

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio, pri Edmond Privat, mondialisto kaj esperantista verkisto. Vi aŭdas la 4-an prelegon pri tiu ĉi temo per citaĵoj el lia verko *Interpopola Konduto*.

Edmond Privat bedaŭras, ke al Unuiĝinta Naciaro *mankas ia mistiko, ia propra patriotismo, ia kredo, ia lingvo, ia religio aŭ adoro por subteni ĝian moralon*. UN havas nur ĉarton. *Tio estas tro seka*, konkludas la aŭtoro de *Interpopola Konduto*. Kiel bona konanto de esperanto, li interese komparas, ke *se oni ekzamenas esperanton, oni kontraŭe rimarkas ion, kio elstaras : tio estas la mistiko, kiun ĝi disvastigis ĉe siaj uzantoj*.

Ni plue citu lin : *Esperantismo entenas ĝuste tiun amikeman mistikon – senkoleran kaj senmalaman – kiu mankis al Ligo de Nacioj kaj ankoraŭ mankas al UN por varbi la koron de l' amasoj per lernejo kaj fervoro*.

En la interna ideo de la esperantista mondo, daŭrigas Edmond Privat, *la lingvosciencistoj, kiuj penas ekzameni la faktojn vidos kristaliĝon de tiu religia sento, kiu mankas al Unuiĝinta Naciaro. En lernejoj esperanto montriĝas katekismo pli vivanta kaj pli efika ol diplomataj aŭ juraj formuloj*.

Aŭskultu la priskribon de la esperanta mistiko, kiu laŭ Edmond Privat fakte mankas al organizaĵo kiel UN : *Esperantismo naskiĝis el simpatio kaj scivolemo pri nacia vivo de la ceteraj popoloj, speciale la malgrandaj. Ĝi entenas la plezuron ilin koni kaj ilin trovi amindaj, ankaŭ la ĝojon konigi al ili la valorojn de la propra patrujo kaj plie ĝui siavice la fakton, ke tio plaĉas al ili*.

El tiaj akiritaj kutimoj formiĝas novaj moroj de interpopola konduto, konkludas Edmond Privat. Legante tion, oni komprenas, kial li tiom batalis favore al esperanto, ĝin disvastigante laŭ ĉiuj siaj fortoj. Li estis fakte konvinkita, ke *el sentoj vivas la homaro multe pli ol ĝi vivas el racia pripensado*. Por li *la estonteco apartenas al tiu kredo, kiu preĝas per agoj utilaj al ĉiuj. Kio gravas, tio estas plimultigi la eksperimentojn pri paco kaj justeco*. Kaj ni scias, kiom da eksperimentoj pri paco kaj justeco Edmond Privat mem iniciatis : kongresoj ĉiuspecaj uzantantaj nur esperanton kiel perilan lingvon, fondo de movadoj : Universala Esperanto-Asocio, Universala Ligo, Mondasocio pri mondfederalismo, subteno al ĉiuj konstruigaj faroj : agado de Servo Civila Internacia, influo de la neperfortemuloj kiel Gandhi, Lanza del Vasto, Vinoba Bhawe, Danilo Dolci, Lecoq, redaktado de regulaj kronikoj en gazetoj kiel *L'Essor*, *La Sentinelle*, *Coopération* kaj *La Praktiko*, funkciigo de regula Somera Universitato, de altnivelaj kulturaj manifestacioj esperantistaj, kreo de monda neŭtrala monunuo : la Stelo, ktp.

Edmond Privat forlasis la poezion por pedagogia laboro. Tion pravas liaj libroj, kiuj ĉiuj estas verkitaj laŭ la stilo de lernolibroj. Kiel bona psikologo li malofte konkludas, li lasas tiun laboron al siaj legantoj, kiuj havas tiel la impreson malkovri novajn freŝajn ideojn. Tiuj ideoj tiel fariĝos ĉe siaj ek trovintoj vivantaj kaj fruktigaj ; Edmond Privat, pere de siaj verkoj asekuris, firmigis la laboron de sia antaŭulo Zamenhof, kies vivon li idealisme diskonigis al la esperantistaro. La verko *Historio de Esperanto* disvastigis ĉefe la internan ideon, la homaranismon, la pacdeziron inter la esperantista popolo. Edmond Privat ne nur konstatas, ke esperanto vivigis novan mistikon, li partoprenis al ĝia formulado. La valorega libreto *Esprimo de sentoj en esperanto* komprenigas al la esperantistoj la originalecon kaj funkciadon de ilia lingvo.

La vivo kaj la penso de nia samideano tiom identiĝis al tiuj de Zamenhof, ke estas emociige mediti lian belan poemon *Saluto al Zamenhof* ĝin recitante honore al ambaŭ antaŭuloj de pli homeca homaro : honore al la aŭtoro de la lingvo esperanto kaj al ties genia defendanto.

*Al ĉiuj popoloj benatan donacon
Vi faris, trafante la vojon plej bonan :
En koroj de l' homoj eksemis vi pacon,
Sur lipoj semante la lingvon belsonan.*

*Nun kreskas en mondo spirito homara,
Kaj iom el via noblega animo,
Per ĉiu parolo de lingvo la kara
En koroj vastiĝas al vivo sen limo.*

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la penso de Edmond Privat,
mondialisto kaj esperantista verkisto.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-